NIA VOĈO

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MARTO 2004**

## ESPERANTA PEN KANDIDATIGAS WILLIAM AULD POR NOBEL-PREMIO

Jam la okan jaron sinsekve la esperanto-literaturo sukcesas esprimi propran, nekontesteblan kandidaton al la Nobel-premio: temas pri William Auld, baldaŭ 80-jara. La signifo de tiu propono estas duobla: unuflanke Esperantio kapablas esprimi kandidaton, aliflanke ekzistas unuanimeco inter la diversaj skoloj pri la nomo de tiu kandidato. La nomon fakte proponas ne nur la Esperanta PEN (kiun Auld prezidis) sed ankaŭ EVA kaj aliaj. Sendepende de la rezulto, la supraj kapablo kaj konverĝo estas jam rimarkinda sukceso. William Auld estas interalie la aŭtoro de la plej grava poezia ĉefverko post la dua mondmilito: "La infana raso". Al la ampleksa originala produktado aldoniĝas la tradukoj, sed ankaŭ brilaj atingoj kiel didakto: ekzemple lia krestomatio "Paŝoj al plena posedo" bonege rezistas al la tempo, kvankam jam 35-jara. (Heroldo Komunikas 221)

## AKTIVAS LA KOMITATO KEILEU

KEILEU estas nova siglo en la jam tre bunta universo de esperantaj mallongigoj: Komitato por la enkonduko de la internacia lingvo en Europan Union. Ĝi estis kreita sine de la Radikala Partio la pasintan decembron, kaj devus konsisti el po unu reprezentanto de la (baldaŭ 25) EU-ŝtatoj. Por efike labori, KIELEU bezonas enradikiĝi en la ceteraj 14 EU-landoj. Tial ke oni devas labori kun la naciaj ministerioj pri publika klerigado, tre taŭgas fakuloj pri pedagogio aŭ interlingvistiko aŭ sistemoj de instruado, ktp. Kio tamen malofte estas la kazo de la ĝisnunaj komitatanoj. (Heroldo Komunikas 221)

## GAZETOTEKO

Ni denove devas gratuli al Jesuo de las Heras kiu zorgas pri la gazetoteko Lanti www.gazetoteko.com kaj ke kune kun la numero 61 de "Kajeroj el la Sudo" inkludis konpaktdiskon kun la unuaj 199 numeroj de "Boletín" de HEF. En la gazetoteko oni povas konsulti la kolektojn de diversaj esperantaj revuoj, inter ili Nia Voĉo.

## GRANDA VORTARO Fundación Esperanto

La verko estis prezentita en Toledo kaj Madrido profitante du cirkonstancojn: la 100-a datreveno de HEF kaj la eldonado de la GV, ambaŭ estas bonegaj okazoj por informi ekstere pri Esperanto.

Ateneo de Madrid. La ĉeesto estis kontentiga sed la resulto en komunikila informado vidiĝos iom poste. La interveno de la tri partoprenantoj dauris iomete pli ol unu horo, sed ĝin sekvis unuhora viglega kolokvo kun interesplenaj kaj altnivelaj demandoj de la publiko. La malbona flanko estis la novaĵo, ke la eldono praktike elĉerpiĝis en rekorda tempo. Nova reviziita eldono nur eblos por la jaro 2007, sed eventuale povus okazi baldaŭa represo de la nuna Vortaro, se oni trovus financ-rimedojn.

Provinca Biblioteko de Toledo La alveno de publiko estis minimuma, sed ekzistis informado en radioj kaj ĵurnaloj.

Por tiuj, kiuj interesiĝos pri similaj prezentoj, Fundación disponas je komentitaj lumbildoj (PowerPoint) kiujn oni uzis kaj oni povas pruntedoni al interesatoj. Informojn pri la historio vi povas nun trovi en la retpaĝaro de HEF. (Tonyo kaj Darío)

## ESPERANTO EN AMASMEDIOJ

La 22-an frumatene, en la radiprogramo "Cita con Pilar" de RNE3, estis intervjuata la informestro de HEF Manuel Pancorbo, okaze de la prezentado de la Granda Vortaro Hispana-Esperanta. La programon estras la ĵurnalistino Pilar Socorro, kiu por la dua fojo dediĉas programon al nia lingvo.

## BIOGRAFIO DE ZAMENHOF

Madrida Esperanto Liceo ricevis kiel donaco de Henri Masson, la francan kaj la esperantan version de la bonega verko de René Centassi kaj Henri Masson "La homo kiu defiis Babelon",

kiun jam publikigis tre sukcese en Francio la eldonejo L'Harmattan: du eldonoj franclingvaj ("L'homme qui a défié Babel), kaj unu eldono esperantlingva. La tre fama verkisto Umberto Eco kvalifikis ĝin kiel la plej bona biografio de Zamenhof, kaj asertis ke li rekomendos la legadon al siaj gelernantoj. MEL studas la eblecon por traduki kaj eldoni la verkon.

**GIAN CARLO FIGHIERA**

HEF, kiel hispana esperanta asocio, prezentis la kandidatecon de Gian Carlo Fighiera por UEA Honora Membro. Li dediĉis sian tutan vivon al la E-movado, sindoneme, senlace, metante ĉiam tutan koron en la plibonigado de la movado kaj speciale de UEA, kaj kreante ĉiam amikecan etoson en nia movado. Gian Carlo kune kun sia edzino Ada loĝis en Madrido kelkajn jarojn kaj plialtigis la nivelon de Madrida Esperanta Liceo. Ni tutkore deziras al li tiun agnoskon kiun li sendube meritas.

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretario, Manolo Parra, deĵoras lunde kaj jaûde vespere (18,30-21,00h); dum aliaj tagoj vi povas faksi aû telefoni al 91 446 80 79 aû kontakti rete admin@esperanto-es.net
Retadreso de Boletín: bulteno@esperanto-es.net Bv. uzi ĝin nur por Boletin-aj aferoj. Por informpetaj retmesaĝoj uzu info@esperanto-es.net

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

15-a de marto 18,30 Rodriguez San Pedro 13. Lumbildoj "Nia Hispanio: Nekonata Madrido". Carmen Suárez

La Valencia-Murcia E-kongreso, laŭ la normala ordo, ĉi jare devas okazi en la provinco Valencia. La valenciaj esperantistoj akceptis la inviton de Cheste okazigi la kongreson en tiu vilaĝo, simbola por nia movado. http://www.infonegocio.com/augustocasquero/cheste.htm
La dato estos 29-30 de majo (sabato-dimanĉo).

6-a Eŭrop-Unia Esperanto-Kongreso. 25-29 aŭgusto 2004. BILBAO. Pli da informoj:
www.geocities.com/esperantobilbao/eue.htm

ESPERANTO EN LA RETO

El Popola Ĉinio malfermis retpaĝaron por la 89-a Universala Kongreso, kiu okazos en Pekino, ĉe: http://www.espero.com.cn/uk2004/e02-2.htm.

La radioestacio "Radio-Esperanto", prizorgata de usonano, elsendas e-muzikon dum 24 horoj ĉiutage: http://www.radio-esperanto.com +

ESPERANTO LICEO DE MADRID
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid